


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ helmikuu ♦ februaro ♦ 1/2002



Lertfingrulo povas plekti eĉ helikon el saliko. Intervjuo de Kimmo Hakala, p. 27.

Vintraj Tagoj: programo, p. 5

Liisa Viinanen, p. 8

Aleksander Korĵenkov, p. 12

Jukka Laaksonen lasas prezidantan postenon, p. 3



Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 13,50 •/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 •; Baltio 10 •, aliaj landoj 13,50 •.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmögatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 3313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Anna Ritamäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Sekretario/Sihteer: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Heikkinen, Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ annaliisa.heikkinen@surfeu.fi

Esa Lång, Lokinkatu 5, 15610 Lahti. ☎ (03) 735 2723

Päivi Saarinen, Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Eila Martin, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ raitapy@jymy.kase.fi

Jukka Vaijärvi, Neulapadontie 3 C 21, 00920 Helsinki. ☎ (09) 349 7334 ✉ jukka.vaijarvi@dinosoft.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ kasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Officejo/Toimisto: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Jam temp' esta'

Ĉi tiu estas mia lasta prezidanta artikolo en Esperantolehti. La asocio do elektos novan prezidanton de EAF en la venonta jarkunveno en Mikkelo.

Mi nek volas fari analizon pri tio, kio sukcesis kaj kio ne dum la pasintaj jaroj nek fari alian rigardon malantaŭen. Mi nur volas konstati, ke "jam temp' esta'" por havi novan personon kun novaj ideoj kaj novaj opinioj. Aŭ eble eĉ ne novan sed almenaŭ malsaman.

Forlasante la prezidantecon mi ne volas forkuri de la laboro kaj respondeco, ĉar mi scias, ke tio ne estas bona konduto. Mi ja scias, ke restas multo farenda kaj farinda en EAF kaj ke farantoj ĉiam ŝajnas esti tro malmultaj kiel kutime en volontulaj organizaĵoj. Plej multe mi volas havi paŭzon por reordigi mian vivon, pensojn kaj rilaton kun Esperanto, retaksadi la tuton. Mi kredas, ke ĉiu homo iam alfrontas tian situacion. Laborado por Esperanto estis kaj estas pozitiva afero por mi, sed daŭra restado en decidanta rondo iel mortigas iniciatemon kaj tio estas malavantaĝo por la asocio. Ĉiuokaze mi certe restos aktiva esperantisto. Mi restis en la estraro sinsekve 20 jarojn kaj tio ja estas longa tempo en homa vivo. La jaroj tutcerte ne pasis vane, ĉar ili almenaŭ riĉigis mian vivon kaj mondon multege kaj mi povis konatiĝi kun multaj homoj, ricevi multajn amikojn kaj havi multajn neforgeseblajn spertojn.

Dum la pasinta aŭtuno estis multfoje dirite, ke post la teroristaj atakoj en Usono la

mondo ne plu restas tia, kia ĝi estis. Kvankam la okazoj montris, ke la mondo vekigis batali kontraŭ terorismo, tamen aliflanke oni ankaŭ komencis pli profunde pensadi la kialojn de terorismo. Tiu certe estas pli bona maniero ol komenci arbitre mortigi suspektindajn homojn. Estas du manierojn fari la mondon pli bona: klopodi forigi tiujn, kiuj malsame opinias kaj klopodi forigi la kaŭzojn de malamo inter popoloj kaj homgrupoj. La unua estas egoisma kaj la alia homaranisma.

Dum la pasinta aŭtuno oni ankaŭ ofte kritikis religiojn kaj fundamentajn religianojn pro la nutrado de malamo kontraŭ alireligianoj. Samtempe multaj religiaj gvidantoj unuanime asertas, ke laŭ iliaj kredoj ne estas permesite mortigi aŭ militi. Kiam oni tamen mortigas kaj militas, tiam temas do pri miskomprenado aŭ mistaksado de la doktrinoj. Estas tamen malĝuste akuzi religiojn mem aŭ unuopajn kredantojn, se religioj estas subigitaj de naciismaj, eĉ imperialismaj celoj, kiel ĝis nun bedaŭrinde ofte okazis.

Forlasante la prezidantecon de EAF mi esperas, ke la asocio trovu bonan prezidanton kaj bonan, entuziasman, interkompreneman kaj pozitive kunlaborantan estraron. Mi restas je dispono por agadi en la asocio laŭ mia kapablo. Mi volas ankaŭ elkore danki ĉiujn, kiuj dum la pasintaj jaroj kunlaboris en kaj kun la estraro de EAF kaj en diversaj taskoj de la asocio.

Jukka Laaksonen

Nova ĉefredaktoro al Esperantolehti serĉata

Leginte la mesaĝon de nia prezidanto, ke li volas lasi sian postenon, mi post longdaŭra pensado volas fari la saman. Ekde 1997 mi estas la redaktoro de Esperantolehti, kvin jarojn. Tiu periodo estis laborokaj memoraj plena tempo. Dum tiu periodo mi pensiuliĝis kaj la redakta laboro helpis min en la transiro el laborvivo al tuttempa libera umado. Persone al mi la okupado kun Esperantolehti estis konsola afero, kiam mi preskaŭ unu jaron en komenco de mia pensiula vivo pensis, ĉu mi faris juste, kiam mi adiaŭis al la laborvivo.

Kiam mi komencis la redaktorecon de Esperantolehti, Jukka Pietiläinen multege helpis min. Dankon al li ankoraŭ. Nun la situacio estas pli facila al nova ĉefredaktoro. Por nia periodaĵo ekzistas redaktgrupo, kiu konsistiĝas el profesie altkvalita personoj. Do, la ĉefredaktoro ne necesas mem esti profesiulo, sed iom sociema por ke la laboro kun redaktgrupo povas kreski el novulo veran ĉefredaktoran talenton. Mi esperas ke la delikata kunlaboro inter redaktoro kaj redaktgrupo ne perdiĝus en estontece, por ke ĉiam novaj redaktoroj de Esperantolehti trovus helpantojn. Kiel retkomunumo la redaktgrupo de Esperantolehti efektivigas ĝuste tiel la redaktan laboron kiel oni faras ĝenerale ĉie en la mondo, ne nur en esperantaj amas-komunikiloj. Tio estas la forto de nia redaktgrupo kaj oni povos en estonteco pli-

vastigi kaj ankaŭ reformi la formaton de Esperantolehti laŭ necesoj de nia finnlanda E-komunumo.

Mi estas ekde aŭtuno 2001 ankaŭ redaktoro de *Leteroj en Monato*. Mi plenumis la du redaktorecojn samtempe, sed ĉijare mi rimarkis, ke estas ŝarĝe fari tiel. La redaktoreco en *Monato* estas interesa kaj instrua laboro, mi diru, ke per ĝi finedukiĝas redaktantoj en Esperanto al ilia plena profesieco. La aferoj, kiujn la *Monato*-redaktoro devas solvi, estas esencaj por verkado en altvalita Esperanto. Tial mi dankas al redakcio de *Monato*, ke mi havas eblon labori por la periodaĵo. Mi pensas ke redaktado de du periodaĵoj estas maleltenebla. Tial mi volas lasi mian redaktorecon en Esperantolehti kaj koncentriĝi al miaj *Monato*-laboroj, kiuj postulas tre multe da tempo.

Do, la posteno de ĉefredaktoro vakas. Interesitoj pri la afero kontaktiĝu kun Aimo Rantanen. Eble la redaktkomitato povus trovi inter si novan ĉefredaktoron. La laboroj de la ĉefredaktoro komencos de la numero 2/2002. Mi estis en la jaro 1997 la ununura kiu volis posteniĝi kiel ĉefredaktoro post Jukka Pietiläinen, espereble ni havas nun pli da kandidatoj. Mi volus resti kiel ano de redaktgrupo kaj certe mi recenzos interesajn librojn kiel ĝis nun.

Aimo Rantanen

Literaturo – plupera kaj novkrea forto

Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando

23.-24.3.2002 Mikkeli, Suomen Nuoriso-opisto, Paukkulantie 22

La programo de la Vintraj tagoj koncentriĝos ĉefe al literaturo. La Esperanta literaturo estas grava elemento en la konstruo de la lingvo. Ĝi ankaŭ estas la plej evoluinta parto de nia kulturo. Vi aŭdos poemojn, ankaŭ kantitajn poemojn, prezentojn, prelegojn kaj vi mem povos prezenti vian plej ŝatatan Esperantan libron. Kunprenu libron kaj ekvojaĝu en la literaturan mondon! Nia literatura ĉefĉiĉerono estos **Aleksander Korĵenkov**, eldonisto kaj redaktoro el Ruslando.

Spertu ankaŭ la enpaŝon de la sopranulino **Liisa Viinanen** sur la Esperantan scenejon! Ŝi prezentos operon por unu virino. Akompanos ŝin pianistino Hanna-Leena Kalaoja.

Programo

Sabaton la 23an de marto

- 11.00 Malfermo de akceptejo
- 12.00 Lunĉo
- 13.00 Bonvenigaj vortoj
- 13.15 Aleksander Korĵenkov: "Pri la Esperanta literaturo"
- 15.00 En grupoj: prezentado "Mia libro" kaj kafo
- 16.00 Aleksander Korĵenkov: "Dek jaroj de profesia vivo en Esperantujo"
- 17.00 Kunsidoj (ELFI, FEJO k.a.)
- 18.15 Akcepto por anoj de Societo Nino Runeberg
- 18.30 Vespermanĝo
- 19.30 Plupera kaj novkrea vespero
- Liisa Viinanen: Opero por unu virino "Duraj sortoj Napolaj"

– Kunestado kun kvizo, poemoj kaj kunkantado

Dimanĉon la 24an de marto

- 8.00 Matenmanĝo
- 9.00 Matenpreĝo organizita de KELF
- 9.30 Kontrolo de rajtigiloj
- 10.00 Jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando
- 12.00 Lunĉo
- 13.00 Aleksander Korĵenkov: "Gaston Waringhien 100-jara"
- 14.30 Adiaŭa kafo

Loko

La loko de la aranĝo, *Suomen Nuoriso-opisto*, situas ĉ. 2 kilometrojn de la ĉefa placo Hallitustori, kie estas la haltejo de la loka aŭtobusa linio 1A/1B kaj haltejo de taksioj. La loka aŭtobuso veturas sabate unufoje en horo, ekz. je 11.15, kaj la vojaĝo estas iom nereakta, tamen ne tro longdaŭra, kvankam oni bone marŝas al la instituto en sama tempo. En la plano (vd. p. 7) estas markitaj la instituto, Hallitustori kaj la trajna kaj aŭtobusa stacioj.

Pliaj informoj

Se vi havas demandojn pri la Vintraj tagoj, vi povas kontakti kun Anna Ritamäki (programeroj) aŭ Päivi Saarinen (loĝado kaj aliaj praktikaĵoj), bv. vidi kontaktinformojn sur paĝo 2. Ankaŭ indas sekvi la informojn en la retejo de la asocio <<http://www.esperanto.fi>>.

Kirjallisuus – ajatuksia välittävä ja uusia luova voima

Suomen Esperantoliiton talvipäivät

23.-24.3.2002 Mikkeli, Suomen Nuoriso-opisto, Paukkulantie 22

Talvipäivien ohjelmassa keskitytään tällä kertaa kirjallisuuteen. Esperanton kirjallisuus on tärkeä osa-alue kielemme rakentamisessa. Se on myös kulttuurimme kehittynein alue. Tulette kuulemaan runoja, myös laulettuina, esittelyjä ja esitelmää, ja voitte myös itse esitellä rakkaimman esperantokirjanne. Kirja kainaloon ja matkaan kirjallisuuden maailmaan! Pääoppaanamme toimii **Aleksander Korĵenkov**, kustantaja ja toimittaja Venäjältä.

Koe myös sopraano **Liisa Viinasen** esiintyminen esperantolavoilla! Hän esittää yhden naisen oopperan säestäjänään pianisti Hanna-Leena Kalaoja.

Ohjelma

Lauantai 23.3.

- 11.00 Vastaanotto avataan
- 12.00 Lounas
- 13.00 Tervetuliaissanat
- 13.15 Aleksander Korĵenkov: ”Esperantokirjallisuudesta”
- 15.00 Ryhmissä: esittely ”Minun kirjani” ja iltapäiväkahvi
- 16.00 Aleksander Korĵenkov: ”Kymmenen vuotta Esperanton ammattilaisena”
- 17.00 Kokouksia (ELFI, FEJO jne.)
- 18.15 Vastaanotto Nino Runeberg -seuran jäsenille
- 18.30 Iltapala

- 19.30 Ajatuksia välittävä ja uusia luova ilta
- Liisa Viinanen: Yhden naisen ooppera ”Kovia kohtaloita Napolista”
- Yhdessäoloa tietokilpailun, runojen ja yhteislaulun merkeissä

Sunnuntai 24.3.

- 8.00 Aamupala
- 9.00 Aamuhartaus (KELF)
- 9.30 Valtakirjojen tarkastus
- 10.00 Suomen Esperantoliiton vuosikokous
- 12.00 Lounas
- 13.00 Aleksander Korĵenkov: ”Gaston Waringhien 100 vuotta”
- 14.30 Iltapäiväkahvi ja loppusanat

Kokouspaikka

Talvipäivien tapahtumapaikka, Suomen Nuoriso-opisto, sijaitsee n. 2 km:n päässä Hallitustorilta, josta lähtee paikallislinja 1A/1B ja jossa sijaitsee myös taksiasema. Paikallisbussi kulkee lauantaisin kerran tunnissa, esim. 11.15, ja sen reitti saattaa tuntua mutkaiselta muttei kuitenkaan pitäisi kestää kovin kauan, vaikka ripeäjalkainen varmasti taittaa matkan myös yhtäläillä kävellen. Mikkeliin pääsee julkisista kulkuneuvoista sekä junalla että linja-autolla. Viereisen sivun kartasta näkyvät nuoriso-opiston, Hallitustorin sekä juna- ja linja-autoaseman sijainti.

Kunprenu libron al Vintraj tagoj!

Literaturo estas plupera kaj novkrea forto. Ĝi peras de la diversaj kulturoj. Ĝi peras ideojn inter diversaj homoj. Kiam la teksto estas skribata ankaŭ io nova estas krea.

Certe ankaŭ vi legis iun Esperantlingvan verkon, kiu vin inspiris, ĝojigis aŭ eĉ plorigis, iun interesan verkon, kiun vi volonte rekomendus al aliaj. Kunprenu libron kiun vi ŝatas al la Vintraj tagoj! Ĝi povas esti via unua lernolibro, slipeto kun poemoj, faklibro aŭ romano, simple iu ajn verko en Esperanto. Ne gravas ĉu ĝi estas tradukita aŭ originala verko.

Ni faros ekzpozicion kun la nomo "Mia libro". Ni preparos la ekzpozicion kune post la unua prelego.


Kirja mukaan talvipäiville!

Kirjallisuus on ajatuksia välittävä ja uusia luova voima. Se toimii välittäjänä eri kulttuurien välillä. Se välittää ajatuksia ihmisiltä ihmisille. Tekstin kirjoittamisen myötä syntyy myös jotakin uutta.

Jokainen meistä on varmaan lukenut jonkin esperantonkielisen kirjan, joka on antanut innoitusta, saanut hyvälle tuulelle tai jopa kyynelähtimään, jonkin kiinnostavan

teoksen, jota mielellään suosittelee toisillekin. Ota talvipäiville mukaasi kirja, josta pidät! Se voi olla ensimmäinen oppikirjasi, runovihkonen, ammattikirja tai romaani, yksinkertaisesti esperantonkielinen kirja. Kirja voi olla alun perin esperantoksi kirjoitettu tai käännetty, miten vain.

Valmistamme näyttelyn, jonka teema on "Minun kirjani". Teemme näyttelyn yhdessä ensimmäisen luennon jälkeen.



Lisätietoja – Mikäli haluat kysyä lisää talvipäivistä, otathan yhteyttä Anna Ritamäkeen (ohjelmaan liittyvät asiat) tai Päivi Saariseen (majoitus ym. käytännön asiat). Molempien osoitetiedot löytyvät Esperantolehden sivulta 2. Myös liiton Internet-sivuilla osoitteessa <http://www.esperanto.fi> kannattaa vierailla.

Liisa Viinanen, opera pintulino

Liisa Viinanen (29j/181cm) estas nova vizaĝo en finnaj esperantaj rondoj. Liisa estas ne nur nova FEJO-aktivulino kaj la sporta forto de FEJO. Ŝi estas ankaŭ unu el la plej promesoplenaj junaj oper-talentoj en Finnujo.

Jarkomence Liisa vaste aperis en la finna gazetaro. Ŝi partoprenis la kantokonkurson de Lappeenranta (2.-6.1. 2002). Liisa kantis en la duonfinalo kaj akiris specialan premion pro rara voĉ-materialo.

En la Vintraj Tagoj de Mikkeli Liisa koncertos per unika programero.

Riitta: Liisa, antaŭ ne longe vi partoprenis la kantokonkurson de Lappeenranta. Kiel oni atingas la kantorajton en ĉi konkurso? Kaj kiom da partoprenintoj estis?

Liisa: La kantorajto venas tra provkantoj. Inter 60-70 oni elektis 28 partoprenantojn por la konkurso.

Riitta: Kion vi kantis?

Liisa: Mia programo konsistis ekzemple el Sibelius, Tŝaikovski, Sallinen, Strauss, el la trezorario de Gounod Faust.

Riitta: Ha, tiun vian trezorarion ja oni speciale laŭdis en la gazetaro. La ĵurnalo Helsingin Sanomat skribis, ke verŝajne neniu ankoraŭ same pompe kantis pri siaj juveloj kiel Liisa Viinanen. Hmm... mi jen montras mian enorman operan konon... Ĉu fakte temas pri tiu ario, konata ankaŭ el la komikso Tinĉjo? Tiu, kiun kantas Bianca Castafiore?

Liisa: Jes ja, ekzakte!

Riitta: Mi rimarkis, ke en la duonfinalo estis tre malmultaj basuloj aŭ kontraltulinoj. Kial tio?



Ĉu la konkurso estas nur por tenoruloj kaj sopranulinoj?

Liisa: Ne, sed en Finnlando momente estas nur malmultaj basuloj aŭ kontra-altulinoj. Se foje aperas bona basulo aŭ kontra-altulinoj, estas raraĵo. Li aŭ ŝi eĉ ne devas konkursi.

Riitta: Kial oni cetere partoprenas konkursojn? Ŝajne Karita Mattila kaj Martti Talvela gajnis siatempe en la sama konkurso. Kiom signifaj estas ĉi tiaj konkursoj por la kariero?

Liisa: Nu, estas ja kiel publika provkanto. Labormerkata afero. Se la ĝustaj personoj vin tie aŭdas, oni eĉ ne devas gajni la konkurson por akiri laboron. Kaj oni lernas koni sin mem: Kiel mi reagis en tia ekscita situacio. Mia reago estis por mi surprizo. Mi certis antaŭe, ke mi ne ner-

vozus. Sed kiam mi iris sur la scenejon, mi havis tri sendormajn noktojn. Eĉ se oni diras al si mem "Stulte! Ĉesu nervozi", ne helpas. Utila sperto entute.

Riitta: Kia estis la etoso en Lappeenranta? Ĉu amika aŭ agace konkursa?

Liisa: Por mi estis amuza etoso. Estis tre bone organizita konkurso. Mi havis multajn geamikojn tie de Sibelius Akademio. Estas ja tiel, ke oni babilas kun la samaj homoj kiel ankaŭ dum aliaj tagoj kaj kun kelkaj ne multe. Kaj ni ĉiuj scias, ke en kantado oni ne povas vere konkursi. Temas pri subjektivaj juĝoj kaj opinioj.

Riitta: La konkurson ja gajnis Arttu Kataja kaj la antaŭfavorito Helena Juntunen. Vi ne atingis la finalon, sed la duonfinalon. Ĵurnaloj karakterizis vin la plej talenta, kiu ne kantis finale kaj laŭdis vian voĉon, eĉojn de "dramatika sopranulino" kaj vian valkirian aspekton. Ĉu desapontiĝo?

Liisa: Nu, iom. Mi povintus kanti en finalo, mi ne opiniis, ke estus maleble por mi. Sed nun okazis ĉi tiel. Sed mi certe lernis pli. Kaj mi ricevis specialan premion pro "rara voĉmaterialo". Mi ja havas nenian haston ien ajn.

Riitta: Kion cetere signifas "dramatika sopranulino"?

Liisa: Nu, oni povus klasifiki la sopranulinojn al A) Viglaj servistinoj. Ili ĉiam pluvidos. B) Virinoj, kiuj plenas je amo. Ili supozeble pluvidos. C) Virinoj, kiuj havas iomajn suprojn en sia vivo. Ili malrapide mortas. Ilin mortigas pulma malsano. Aŭ ponardo. Post ponarda trafo ili plu kantas kvaronhoron. D) Dramatikaj sopranulinoj havas ĉiam sangan finon. Ili aŭ mortigas ĉiujn aŭ sin mem. Foje ili frenezigaĝas. Ĉiuj viroj, cetere, restas fine por la viglaj servistinoj.

Riitta: Kia interesa klasifiko! Kio post la konkurso?

Liisa: La vivo pluas. Mi plu studas en Sibelius-Akademio. Mi havas nun trejniĝojn por la opero

Suomen Esperantoliiton Talvipäivät 23.-24.03.2002 Mikkelissä

Ilmoittaudun talvipäiville:

Nimi _____

Osoite _____

Puh/fax/s-posti _____

Ilmoittautumismaksu

28.02.2002 saakka 16 • _____

1.3. jälkeen 20 • _____

Puoli maksua FEJOn varsinaisilta jäseniltä.

Kokouspaketti

56 • (2hh, ruokailupaketti) _____

74 • (1hh, ruokailupaketti) _____

33 • (ruokailupaketti) _____

24/40 • (lisäyö pe-la 2hh/1hh) _____

Maksan _____ • EAF:n tilille

Toivomuksia majoituksen ja ruokailun suhteen:

Lähetä ilmoittautumisesi osoitteella:

Suomen Esperantoliitto ry.

Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Maksut EAF:n tilille: Sampo 800017-230825

TERVETULOA!

Vintraj Tagoj de EAF
23.-24.03.2002 en Mikkeli

Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj:

Nomo _____

Adreso _____

Tel/fakso/retpoŝto _____

Aliĝkotizo

Ĝis 28.02.2002 16 • _____

Ekde 1.3.2002 20 • _____

Duono por ordinaraj membroj de FEJO.

Kunvena paketo

56 • (2-lita ĉ, manĝopaketo) _____

74 • (1-lita ĉ, manĝopaketo) _____

33 • (manĝopaketo) _____

24/40 • (kroma nokto 2/1-lita ĉ.) _____

Mi pagas _____ • al la konto de EAF.

Deziroj pri loĝado aŭ manĝoj:

Sendu la aliĝilon al:

Suomen Esperantoliitto ry.

Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Pagoj al la konto de EAF:

Sampo 800017-230825

BONVENON!

Don Giovanni. Kaj en aprilo mi eble translok-
iĝos Germanien, al Kolonjo.

Riitta: Kial tio? Kial Germanio?

Liisa: Ĉar Kolonjo estas en Germanio kaj ĉar
mi havas germanan voĉon. Estas la tempo iri
pluen, al nova instruisto. Unue mi restos tie jaron
kaj se ĉio estos bone, eble mi restos pli. Ĝis mi
denove iros pluen.

Riitta: Rakontu, kia estas via normala studtago?

Liisa: Kio estas tio? (Rido) Mi kantas ĉiutage.
Mi jam ne plu havas teoriolecionojn kaj povas
nur kanti. Feliĉe!

Riitta: Kiel vi originale trafis muzikmonden?

*Multaj artistoj ja ofte ŝvebas inter du ebloj: Ĉu
arto aŭ "normala" profesio. Laŭdire por Edel-
felt, ekzemple, tre malfacilis la decido, ĉu iĝi
lingvisto aŭ sin dediĉi plene la pentroarto. Kiel
por vi?*

Liisa: Miakaze la decido maturiĝis en trajno
inter Kuopio kaj Helsinko en 1997. Mi ja studis
mediosciencojn en Kuopio, tamen flanke al tio
muzikon. Kaj mi trajnis ĉiusemajne al Helsinko
pro la muzikaj studoj. Ne estis fortoj por daŭra
trajnumado tien kaj reen. Kaj eble mi ne vidas
kantistan karieron kiel malnormalan. Principe
unu ĝorĝinflamo povus ŝanĝi ĉion, detruiri la
tutan karieron. Sed mi ne tro zorgas, ĉar mi scias,
ke mi povus fari ankaŭ aliajn aferojn.

Riitta: Kie vi volus esti post 10 jaroj?

Liisa: Mi volus povi vivteni min kiel opera solo-
ulino. Kaj prefere en granda operdomo. Eblas
pli bone koncentriĝi al tiuj roloj, kiuj estas vere
"miaj".

*Riitta: Kiel vi vidus la pozicion de opero nun-
tempe? Ĉu estas por vi frustrige, ke relative mal-
multaj homoj iras al opero? Kaj kelkaj el ili ne
pro amo al opero, sed por montri sin "kultur-
ozaj"?*

Liisa: Ne tro ĝenas min. Ekzistas ja ankaŭ
homoj, kiuj vivas el aŭtokonkursoj kaj ankaŭ tiu

kampo ne interesas ĉiun. Iom mi bedaŭras tion, ke homoj ofte ne memoras, kio estas la signifo de kulturo. Kiel diras Galina Visnevskaĵa, rusa kantistino, en sia libro: Kiam la vivo ne glate iras kaj okazas tragikaĵoj en la socio, kulturo ofertas kurtan fuĝon de la ĉiutago. Mi memoras la 11-an de septembro, la novjorkan katastrofon. Estis paŭzo en ekzercoj kiam mi vidis la tuton en televidilo. Unue mi pensis, ĉu mi povas entute post tio reveni al la ekzercoj. Sed mi memoris la vortojn de Galina Visnevskaĵa. Mi neniam estus bona flegistino aŭ kuracisto. Tiel mi povus helpi neniun. Sed tiujn etajn fuĝojn mi povas oferti.

Riitta: Se novulo irus al opero, kian konsilon vi donus al tiu persono?

Liisa: Ne atendu logikon similan al ekz. filmo. En filmoj facile per kelkaj trukoj montreblas, ke nun temas pri sonĝo. En opero tio ne same facile eblas. Se oni ne ion komprenas, oni povas tion legi ekz. en la programkajero dum paŭzo. Oni ankaŭ ne pensu, ke estas por "fajnaj homoj kun fajnaj vestoj". Oni simple iru, normale vestite kaj per aperta menso.

Riitta: Vi estas ankaŭ esperantisto. Kiel vi konatiĝis kun Esperanto?

Liisa: Mi lernis aŭtodidakte, en somero -99, en la angla libro "Esperanto por komencantoj". Mi ĉiam ŝatis lingvojn kaj lernis jam multajn: La anglan, la francan, la svedan, la germanan, la rusan, la hispanan, la portugalan, la italan, la hungaran... Ĉu iun mi forgesis... Mi serĉis intence hobion, kiu neniel rilatus al muziko. Mi ankaŭ sportis, ludis i.a. nestopilkon (pesäpallo), sed ankaŭ tie la ludantoj estis el mia muzika mondo. Venis paniko! Mi jam antaŭe aŭdis pri Esperanto kaj pensis, ke estus amuze lerni lingvon, sen devi tre profunde lerni la kulturon. Kun aliaj lingvoj ĉiam venas la punkto, ke oni devas iri al la koncerna lando por lerni, kiel oni tie kisas sur vangeks. Sed tiaj kondukmanieroj en Esperanto man-

kas. Mi pensis, ke Esperanto pli facile vojaĝus kun mi en la mondo ol ekz. trikaĵo.

Nu, poste mi membriĝis kaj abonis Esperanto-lehti. Kaj mi vizitis la oficejon. Estis estrarkunsido de EKH kaj oni parolis pri budĝeto en Esperanto! Kaj mi pensis, ke estas tiom absurde kaj amuze paroli pri budĝeto en Esperanto, ke oni devas lerni ĉi lingvon.

Riitta: Nu, feliĉe, ke la budĝeto ne vin timigis... Ĉu jam vi kantis esperante?

Liisa: Hejme, sub dŭso, mi kantas "Mia kara Klementin'" "... Bona kanto! Kaj ĝi memorigas min pri tio, kiu el tiuj etaj oranĝaj fruktoj estas la plej bona. Ekz. satsumoj estas teruraj. Sed operon mi ankoraŭ ne kantis esperante. Sed baldaŭ... En la Vintraĵ Tagoj de Mikkeli mi koncertos.

Riitta: Pri kio temas? Rakontu!

Liisa: Temas pri kortuŝe tragika rakonto. Pri ĉio, kio povas okazi en la vivo. Unu freneziĝo, neniom da mortintoj... Sed momenton, oni ja povus ankaŭ mortigi iun... Eble la tutan vilaĝon... Kiel fari tion efike...

Riitta: Momenton... Kion? Ĉu vi mem elpensas la rakonton?

Liisa: Jes, temas pri kelkaj kantoj kaj rakonto, kiun mi mem konstruas ĉirkaŭ ili. Opero por unu virino.

Riitta: Ĉu oni ofte faras tiel?

Liisa: Ne. Sed mi aŭdis, ke Seppo Ruohonen iam faris. Multaj kantistoj havas iom striktan sintenon al tiaj aferoj. Oni devus kanti nur en originala lingvo kaj sopranulino ne devus kanti tenorulajn rolojn. Sed mi jam faris esceptojn – temas ja pri cirkosimila prezento, ne tre serioza.

Riitta: Temas do pri tre unika programero en esperanta renkontiĝo! Dankon, Liisa, pro la intervjuo kaj gratulon ankoraŭ pro la bona sukceso en la kantokonkurso de Lapteenranta.

Sezonoj en Vintraj Tagoj: Aleksander Korĵenkov enkondukos nin al literaturo

Ĉu vi jam konas la eldonejon *Sezonoj*? Eble vi estas leganto de la revuo *La Ondo de Esperanto* aŭ legis la romanon *La Mastro de l' ringoj* de J.R.R. Tolkien en Esperanto. Eble la nomumo de la Esperantisto de la Jaro estas konata al vi, aŭ la trarigardoj de la libromerkato, kiujn kutimas verki Aleksander Korĵenkov. Aŭ ĉu vi memoras lian takson pri la jaro 2000, kiun *Esperanta Finnlando* publikigis komence de la pasinta jaro?

Ne gravas, ĉu ĉio ĉi jam estas konata al vi. Gravas ke Esperanto-Asocio de Finnlando havas la honoron anonci: Aleksander Korĵenkov, redaktoro de *Sezonoj*, venos al niaj Vintraj Tagoj en Mikkelo. Li prelegos por ni pri literaturo kaj pri sia pli ol dek-jara vivo kiel profesia esperantisto. Aparte li traktos historian personon, kiun li tre estimas. Temas pri Gaston Waringhien, kiu elstaris en pluraj sferoj de Esperantujo ekde la fino de la unua mondmilito ĝis la falo de la komunismaj reĝimoj en Eŭropo.

Aleksander estas tia esperantisto, kiu verŝajne ne agas por Esperanto se li ne povus okupiĝi ĝuste pri literaturo. Li kun sia edzino Halina Gorecka jam eldonis 76 librojn. Tamen, li agas por la lingva komunumo ankaŭ alikampe. Li estas B-komitatano de UEA kaj li estis prezidanto de la Rusia Esperantista Unio 1995-1997 (baldaŭ post la kunfandiĝo de la du landaj organizaĵoj REU kaj Ruslanda Esperanto-Asocio). Sub lia redakto aperas la ĉiumonata *La Ondo de Esperanto*. Tiu revuo, kies 87a kajero jam atingis la abonantojn, estas konata ne nur pro la noveloj kaj literaturaj suplementoj, sed ankaŭ pro la multflanka pritrakto de okazaĵoj en Esperantujo.



Aleksander Korĵenkov en sia pasporta foto de aŭgusto pasintjara.

En *LODE* okazas malfermaj debatoj, ankaŭ pri tiklaj temoj.

De oriento al okcidento

Aleksander Korĵenkov naskiĝis en 1958 en Kamyŝlov, Uralo. Kiel 18-jarulo li eklernis Esperanton en Tjumeno, kie li studis en la Industria instituto. Li laboris kiel inĝeniero pri petrolaj duktoj kaj konstruado, unue en Tjumeno kaj poste, ekde 1984 en Sverdlovsk, la nuna Jekaterinburg. En 1991 venis la momento por la kuraĝa ekpaŝo en la Esperantan libromerkaton: Li forlasis sian laboron ĉe la firmao *Gazprom* por plentempe eklabori pri eldonado de libroj kaj gazetoj en Esperanto.

Halina kaj Aleksander en Jekaterinburg sopiris al pli internacia etoso. En la fora Azio multis eksterlandaj vizitantoj. Komplike kaj temporabe estis vojaĝi. Sekve ili en junio 2001

kun sia 12-jara filo Aleksej translokiĝis al Kaliningrad – konata pli frue kiel Königsberg – kie ili daŭre povas agi sur Ruslanda teritorio, sed troviĝas en tuja proksimeco al du gravaj Esperantolandoj: Litovujo kaj Pollando. Lia 20-jara filino Tatjana restis en Siberio; ŝi studas lingvojn en Tjumeno.

Babilado ne inspiris

Aleksander eklernis Esperanton studentaĝe, sed kvankam li ŝatis la lingvon, li jam post du someraj tendaroj kaj kelkaj regionaj renkontiĝoj staris rande de kabeiĝo.

– Mirigis min ke preskaŭ neniu el la renkontitaj esperantistoj uzis la lingvon por io pli interesa ol por babilado kun samlandanoj kaj por korespondado kun la tuta mondo pri neniu temo, nur por praktiki la lingvon.

La libroj en la kluba biblioteko ne kaptis lian intereson: lernilaro, politikaj broŝuroj, kelkaj beletraĵoj el Estonujo kaj Bulgarujo kaj *Nuda interlupoj* de Bruno Apitz. La klubo disponigis ankaŭ kelkajn gazetojn, sed *Bulgara Esperantisto*, *Paco, der esperantist* kaj la aliaj Moskve orientitaj informiloj ne interesis la regulan aŭskultanton de BBC kaj *Voĉo de Ameriko*. Tamen ĝuste en la Tjumena klubo li hazarde vidis kelkajn ekzemplerojn de *Literatura Foiro*. Li klare memoras ke inter ili troviĝis ankaŭ la jubilea 50a numero de tiu kultura revuo. Temis pri grava momento.

– Tiuj kajeroj montris al mi la kulturen dimension de Esperanto kaj iusence “savis” min por Esperantujo. Mi komprenis, ke Esperanto estas pli serioza kaj interesa kaj komencis serĉi kontaktojn kun simile pensantaj personoj. Feliĉe, mi trovis ilin.

Li kaj liaj novaj amikoj konstatis ke ili ne povus atendi iun ajn helpon de ASE (Asocio de Sovetiaj Esperantistoj) kaj komencis mem agi. Ili starigis libroservon, ekeldonis kvaronjaran “samizdatan” (preterleĝan) kulturen almanakon *Sezonoj* kaj informilon *Ekzakte*, ekkunlaboris en *Literatura Foiro* kaj *Hungara Vivo*, kaj fondis komunan bibliotekon.

De tiu periodo li aparte memoras la klasikaj-ojn kiuj estis reeldonitaj fine de la 1970aj jaroj en Budapeŝto.

– Tiuj estis la unuaj libroj, kiujn mi legis kun intereso ne nur lingva: *Kvaropo*, *Koko krias jam!* (Szilágyi), *El la “Verda Biblio”* (Lejzerowicz) kaj *Kain kaj Abel* de Sándor Száthmari.

Li kun plezuro rememoras ankaŭ kelkajn aliajn librojn kiujn li legis antaŭ dudeko da jaroj:

– *Quo vadis* de Sienkiewicz, kiun mi ne legis ruse, kaj, *La infana raso* de Auld, eble *Metropoliteno* de Varankin. Mi ŝatis ankaŭ kelkajn librojn “leĝerajn”, el la speco nekonata en Sovetunio: *Transe kaj Neologisme* de Lorjak kaj *Kredu min, sinjorino* de Cezaro Rossetti.

Personaj kaj profesiaj preferoj

Li devas iom retiri sin de sia profesia rolo por respondi la demandojn pri siaj plej preferataj libroj en Esperanto. Li konstatas ke li kiel redaktoro havas “profesian malsanon”.

– Mi tre malofte legas nur por plezuro. Tro multe mi devas legi pro la “oficaj devoj”. Kaj en la nemultaj liberaj minutoj, ekzemple dum la nelonga postvespermanĝa ripozo, mi kutime relegas miajn ŝatatajn librojn ruslingvajn.

Post pripensado li donas iom heziteman respondon:

– Se temas pri la origine Esperantaj, mi diru, ke la eseoj de Waringhien kaj lia kolekto de Zamenhofaj leteroj estas inter miaj ŝatataj libroj. Ĉu ankoraŭ? Eble la prozaj *Vojaĝo al Kazohinio*, *La Litomiŝla tombejo* kaj *Lappar, la antikristo*. Pri poezio mi hezitas elekti, dependas de la humoro: Kalocsay, Nicolino Rossi, Mauro Nervi, Nikolao Kurzens. Eble ankoraŭ unu nebeletraĵo: *Ĉiu ĉiun* de Teo Jung.

Li tute ne mencias la librojn, kiujn li mem eldonis, kvankam pluraj atingis multajn legantojn en Esperantujo.

– Mi ne kutimas relegi librojn, kiujn ni eldonis. Estus malfacile por mi legi denove la epopeon de Tolkien, kiun mi kvin- aŭ ses-foje legis vort-al-vorte komparante ĝin kun la angla originalo kaj la rusaj tradukoj. Ne, mi relegos

nur se estos reeldono.

Sed estas unu escepto. Temas pri la libro *Kvarteto* kun poeziaj verkoj de liaj amikoj.

– Precipe la poemojn de la forpasinta Nikolai Lozgaĉev mi povas relegi, kaj tiujn de Alen Kris, kiu pasint-jare instigis min veni al Baltio.

Kleriĝo pri la propra kulturo

Petita taksu la valoron de la originala kaj de la tradukita literaturo Aleksander Korĵenkov substrekas ke ambaŭ estas gravaj.

– Sed estas bedaŭrinde, ke la Esperanta kulturo estas malmulte konata en Esperantujo. Eble en la mondo estas nun inter 60 kaj 200 mil esperantistoj, sed nur kelkaj centoj el ili regule legas la novaĵojn de nia libromarkato.

Aliflanke, kun sia nacia kulturo oni intimiĝas en la familio, per kino kaj televido, kaj precipe en la lernejo, kie oni dum pluraj jaroj lernas sian literaturon.

– Eĉ la maldiligentaj rusoj memoras *Velon* de Lermontov, la komencon de *Eŭgeno Onegin*, kelkajn aliajn versaĵojn el Puŝkin, Lermontov, Jesenin ...

Li povas listigi plurajn literaturajn protagonistojn (rolulojn), kiujn verŝajne ĉiu ruso konas: Onegin, Peĉorin, Bazarov, Ĉiĉikov, Ĥlestakov, Raskolnikov, fratoj Karamazov, Oblomov, Karenina, Neĥludov, Margarita kaj Veniĉka. Aldone li mencias kelkajn vaste konatajn nomojn de la brita literaturo: Hamleto, Pikviko kaj – reference al la eldonaĵoj de Sezonoj – Alico, Ŝerloko Holms kaj Bilbo Baginzo.

Konklude li prezentas al ni defion:

– Respondu honeste: ĉu “ĉiu esperantisto” en via klubo povas reciti la komencon de *La infana raso* aŭ rememori la peripetiojn de Vitalij Zorin?

La respondo al lia demando kompreneble estas nea. Ankaŭ la intervjuinto troviĝas inter la nekleruloj kiuj nur aŭdis pri *La infana raso* kaj nek konas la nomon Zorin, nek la signifon de “peripetio”. (Tamen *Plena Ilustrita Vortaro* informas ke temas pri “abrupta ŝanĝo de situacio, en romano aŭ dramo”).

Aliflanke, multaj esperantistoj scias parkere la vortojn de *La espero*. Ĉu tio ne estas signo de kultura klereco? La respondo de Aleksander Korĵenkov ne estas tre konsola:



Aleksander Korĵenkov (dekstre) kun William Auld en Prago, 1996. (Fotis H. Gorecka)

– Nu, ke “ĉiu esperantisto” povas reciti la himnon ne havas literaturan kuntekston.

Ni havas multon por lerni, sed eble post la sekvaj Vintraĵ Tagoj pluraj de ni estos iom pli kleraj.

*Verkis surbaze de retroŝta intervjuo
Anna Ritamäki*

Lastatempaj eldonaĵoj

En la du lastaj jaroj ”Sezonoj” eldonis dek librojn sur entute 1384 paĝoj. Ĉiuj libroj (kaj kelkaj pli fruaj eldonaĵoj) estos aĉeteblaj en Mikkeli.

2000

Ĉeĥov A., Bunin I., Nabokov V. Rusaj amnoveloj / Tradukis el la rusa G.Arosev, A.Korĵenkov; Antaŭpar. G.Arosev. 24 pĝ. Serio ”Rusa literaturo”; Vol. 7. – 2 eŭroj.

Gorecka H., Korĵenkov A. Esperanto en Ruslando: Historia skizo. 40 pĝ. Serio ”Scio”; Vol. 4. – 4 eŭroj.

Tolkien J.R.R. La hobito: Fabelo / Tradukis el la angla C.Gledhill, W.Auld. 224 pĝ., il. Serio ”Mondliteraturo”; Vol. 9. – 15 eŭroj.

Tolstoj L. Resurekto: Romano / Tradukis el la rusa V.Sapoĵnikov; Notoj de A.Korĵenkov. 368 pĝ., kromkovrilo. Serio ”Rusa literaturo”; Vol. 6. – 24 eŭroj.

Ĉupin B. Esperanto: Lernolibro por udmurtoj. 80 pĝ. – 4 eŭroj.

Korĵenkov A. Esperanta-rusa vortaro: ĉirkaŭ 2 mil vortoj. 3a eldono. 32 pĝ. – 2 eŭroj.

2001

Gogol N. Malvivaj animoj: Romano / Tradukis el la rusa V.Vyĉegĵanin; Enkonduko, notoj A.Korĵenkov. 224 pĝ., kromkovrilo. Serio ”Oriento-Okcidento”; Vol. 32. – 18 eŭroj.

Cabell J.B. Jurgen: Romano / Tradukis el la angla W.Auld. 240 pĝ. Serio ”Mondliteraturo”; Vol. 10. – 18 eŭroj.

Carroll L. Trans la Spegulo kaj kion Alico trovis tie: Fabelo / Tradukis el la angla D.Broadribb. 128 pĝ., il. Serio ”Mondliteraturo”; Vol. 11. – 9 eŭroj.

Hoffmann E.T.A. Konsilisto Krespel: Novelo / Tradukis el la germana W.Kirschstein. 24 pĝ. Serio ”Germana literaturo”; Vol. 1. – 2 eŭroj.

’Epopo’ pri malaperinta mondpotenco

Marko Polo,

La libro de la mirindaĵoj,

Aŭ la priskribo de la mondo.

Esperantigis Daniel Moirand.

Serio Oriento – Okcidento de UEA, volumo 34. UEA, Rotterdam 2001.

Mondpotenco kiu postlasis kiel heredaĵo nur unu vorton ”ĥano” en okcidenteŭropaj lingvoj, malaperis sen aliaj ŝpuroj el mondhistorio. Ne ekzistas influoj sur kulturo, politiko, lingvoj, religio el la mongolaj dinastioj al ni. Kvankam tiu mondpotenco estis noblule organizita klan-sistemo kaj la ĥanoj sur la pinto de ties hierarkio, la mongola mondpotenco estis laŭ karaktero nomada. Mongoloj subigis eĉ Ĉinion, superŝtaton de longa historio kaj sperto pri diplomatio kaj politiko. La caroj de Ruslando devis fari siajn

adorkliniĝajn vojaĝojn antaŭ la ĥano kiu regis la eŭropan parton de ĥanio, la Okcidentan sinjorejon.

Marko Polo rakontis eĉ ĵurnalisme pri tiu malaperinta mondpotenco. Li vojaĝis el Konstantinopolo laŭ la Silka vojo al Ĉinio, Vjetnamio, Hindio kaj reen al Eŭropo en la jaroj 1254–1296. Marko Polo estis eble dalmatdevena egkmercisto en Venecio. Kvankam li estis fidela subulo de la papo, tio ne malhelpis al li observi kaj noti faktoj dum siaj vojaĝoj sen antaŭjuĝoj. Kiam la vojaĝverko aperis en la malnova franca, nek en la itala, li havis fantomverkiston, la ĝenerala publiko ne povis kredi al li. ”La Miliono”-n, unu el la pli ol cent nomoj, sub kiu ”La libro de la mirindaĵoj” estis konata, plejparto de samepokaj sciencistoj opiniis esti plena de mensogoj kaj fantazio, kiel la historiverkojn de Herodoto. Post tempo de Marko Polo la valoro de lia vojaĝverko estas malkaŝita inter la sciencistoj. *AR*

El “Fantomsimpozio pri la mirfabeloj”

En Mikkeli ni konatiĝos kun Gaston Waringhien – vortaristo, gramatikisto, redaktoro, poeto, eseisto... Por antaŭgustumi iom da Waringhien, legu el lia eseo “Fantomsimpozio pri la mirfabeloj” tri fragmentojn, per kiuj komencas siajn opiniojn liaj reale malrealaj “kunlaborantoj”:

La opinio de Suzaneta

Onĵo donacis al mi, por la dektria reveno de mia naskodato, unu belan libron, kun grandaj paĝoj kaj multe da bildoj (koloraj!) interne, kaj la literojn oni tre facile legas. Nu, Onĵo estas maljuna, kaj ŝi opinias, ke min plu amuzas la fabeloj. Kvazaŭ ni ne estas en la tempo de Françoise Sagan kaj de Johnny Halliday! Sed ŝi estas tiel bonkora, ke mi ne volus ŝin ĉagreni: mi do dankis kun afabla rideto kaj promesis ellegi tiun libron, kvankam en mi mem mi pensis, ke la bildostrioj estas pli taŭgaj por mia generacio. Mian promeson mi plenumis, ĉar mi provas esti honesta – kaj, vidu: mia instruistino postulas redaktaĵon pri ”libera temo”, nu, jen tute trovita rakonto! ...

La opinio de Arieh ben Guni

Via eks-ĉefredaktora Moŝto (Dio vin gardu!), Eble vi ankoraŭ memoretas pri mi, kiu tenis etan spicobutikon apud la presejo de via “Nica Literatura revuo”, kaj kiu al ĝi, senbrue kaj humile, fojfoje kontribuetis? Nu, vere, spicisto mi ne plu estas: dank’ al la malavareco de via glora regno (Dio ĝin benu!), mi ĝuas socian pension: mian libertempon mi okupas kiel mi povas, precipe per legado, aŭ pli ofte per relegado – oni maljuniĝante ne facile alprenas novajn kutimojn, ĉu ne? Tiel okazis al mi relegi, en la antaŭlasta numero de la karmemora Revuo, la

artikoleton de F-ino Suzaneta R.: nu, je mia surprizo, malferminte la volumon (ĉar mi pramane bindigis la tutan kolekton – malriĉa Hebreo devas ĉion fari mem), elfalis el ĝi kelkaj folietoj ...

La opinio de G.E. Maŭra

Estas bona ideo publikigi en unu volumo novan tradukon de la mirfabeloj plej konataj el la franca kaj el la germana literaturo. Tio plenigas en la nia senteblo mankon kaj redonas al nia legantaro la eblon konatiĝi kun unu antikva ĝenro, nun iom neglektata de la modo. La nuntempaj legantoj, infanoj aŭ adoltoj, fascinataj de la bildostrioj kaj de la sciencfikciaĵoj, emas malŝate rigardi tiujn malnovajn historiaĵojn. Kaj tamen! Ĉi tiuj entenas tiom el la vivospertoj de nia prauloj, ke estus malriĉigi nian spiritan heredaĵon, se oni lasus ilin tute perdiĝi ...

“Duraj Sortoj Napolaj”

Kanto: Liisa Viinanen

Piano: Hanna-Leena Kalaoja

**Opero pri amoj, mortoj,
frenezoj kaj aliaj tragikaĵoj
– En Esperanto –**

Sabate, la 23-an de marto
en Mikkeli/Vintraĵ Tagoj
(vd. la programon de la VT
por pliaj detaloj)

Aktive en la lingva reto – kursoraporto

En Esperantolehti 5/2001 mi rakontis pri novtipa lingvo-kurso: reto estus helpanta elemento dum la instruado. Eblis al mi aranĝi la kurson, kvankam partoprenantoj en la komenco estis nur 4; poste ni feliĉe ricevis unu personon pli en nia grupo.

Mia intenco estis havi elementan kurson kaj instrui Esperanton de la komenco. Tamen, ĉiuj kiuj aliĝis jam sciis la bazajn aferojn kaj konis relative multajn vortojn. Tiel la unuaj lecionoj aŭtune enhavis ripetadon de jam konataj aferoj kaj dum la sekvaj ni povis jam lerni novajn. Ni kolektiĝis laŭplane ĉiun duan semajnon kaj por la semajno inter la lecionoj mi donis al la gelernantoj hejmtaskojn. Ili povis sendi respondojn al mi retroŝte kaj mi respondis al ili individue. Dum la leciono ni nur malofte rigardis la hejmtaskojn: nur se io estis malklara aŭ se mi ne havis tempon respondi, ni trarigardis hejmtaskojn kune.

En la mezo de la kurso ni komencis rigardi la videobendan kurson *Pasporto al la tuta mondo* kaj fari ekzercojn ligitaj kun ĝi. Ankaŭ la hejmtaskoj estis ofte de la videobenda kurslibro. Al la kursanoj plaĉis la videobendo, kvankam ĝiaj rakontoj kaj figuroj estas iam naivaj. Tamen ĉio en la videobendo estas prezentita klare kaj ofte ripetita. Fakte, ĉar ne eblis al ni finrigardi la videon, ni interkonsentis pri kroma renkonto ĉe unu el la kursanoj en januaro por scii la tuton de la videobenda rakonto.



Krom videobendo kaj gramatikaj ekzercoj la kursanoj ricevis ankaŭ tekstojn el diversaj esperantlingvaj gazetoj. Ili devis mem skribi rakontetojn ekz. pri la vetero kaj pri sia loĝejo. Dum la lecionoj ili legis kaj tradukis tekstojn kaj respondis al la demandoj de la instruisto. Ankaŭ ludoj estis uzataj: la kartludo *Ludi kaj lerni* kaj la kutima memorludo

estis entuziasme ludataj.

Entute mi estis kontenta pri la kurso. Iom deprimita estis la komenco, kiam mi timis, ke ni devas cesi post tri lecionoj pro manko de studentoj. Dank' al la speciale financita projekto tamen eblis gvidi la kurson ĝis la fino. Alia deprimiga afero estis, ke ne venis veraj novuloj: ĉiuj kursanoj ja jam sciis pri la ideo de Esperanto. Ŝajnas, ke la reklamo nur en reto ne allogas studantojn de laboristaj kaj civitanaj kursoj. Eble ankaŭ la aliĝmaniero estis tro komplika: ne eblis sendi retan aliĝon, sed estis bezonata sendi fakson. Ankaŭ la aliaj kursoj de la projekto *Aktiivisesti kieliverkossa* ne havis multege da partoprenantoj, kaj ĉiuj de la planitaj kursoj tute ne realiĝis. Do mi estas inter feliĉuloj, kiuj tamen povis havi la kurson, kaj tio jam estas nova sukceso por Esperanto.

La kursoj en Turku daŭrigos kiel pli frue: ili estos aranĝitaj de nia societo. Verŝajne estos pliaj malgrandaj grupoj, ĉar tiel eblas trovi taŭgan lernotempon por ĉiuj individue.

Tiina Oittinen, Turku

La filantropia laboro de George Soros

La miliardisto George Soros ne estas ordinara eginvestanto. Ekzistas pluraj verkoj de li, en kiuj li kritikumas la kapitalismon. Li ankaŭ faras per siaj fondaĵoj filantropan laboron ekzemple por romioj en Kosovo, Ĉeĥio kaj Hungario. En tiuj landoj la situacio de romiinfanoj ne estas facila. Malgraŭ ordinara sanstato ili ofte vivas en establoj por handicapitoj. Tiel la majoritato certigas, ke la etna minoritato ne ricevas bonkvalitan edukon, per kio ĝi povus supreniri el mizero. Ĝuste al tiu problemo la fondaĵo de George Soros donas respondon per filantropia laboro. La fondaĵo ebligas instruon al romiaj infanoj en lernejoj fonditaj kaj subtenitaj de George Soros. Li ne helpas nur romiajn infanojn. Soros-fondaĵo ankaŭ subtenas kulturinstancojn en Hungario, Balkanio kaj Mezzazio. Ekzemple universitatojn, bibliotekojn kaj retkafejojn. En la reteldono de

El Popola Ĉinio estas mencio pri projekto "Ponto de kompreno" kiu celas la kunlaboron de esperantistoj en mezaziaj landoj. Biblioteko Chachak, kiu aranĝis Internacian Seminarion Interkulturo en julio 2000 kaj Balkanan Lingvan Festivalon en oktobro 2001 havas tiel bonajn spertojn kun Soros-fondaĵo ke ĝi volas daŭrigi la laboron kun ĝi. George Soros volas ankaŭ porparoli la "Malferman socion", en kiu la plej maljustaj flankoj de okcidenta merkatekonomio estas nivelitaj por unuopaj individuoj. Ekzemple en Mongolio estas unu projekto sub la nomo "Open society". La nomo de George Soros estas kunligita ankaŭ al homaj rajtoj ekzemple en la projekto "Human Rights Watch" (Observo de Homaj rajtoj).

AR

Esperanto en Danio

Mi volas informi la legantojn de Esperantolehti pri Esperanto-agado en Danio, ĉefe en Kopenhago, kie mi loĝas kaj iomete agas en Esperantujo.

La ĉefurbo de Danio havas longan tradicion sur tiu kampo, ĉar la unua klubo ĉi tie estis fondita en 1908, do baldaŭ danaj esperantistoj solene festos 100-jaran datrevenon. Tuj post la fondo de la E-klubo ekstaris multaj aliaj branĉoj, kiel ekzemple Laborista Ligo kaj Studenta Asocio. Kelkaj seriozaj gazetoj organizadis senpagajn kursojn dezirante popularigi la lingvon. Oni lernigis eĉ telegrafistojn kaj fervojistojn por ke la lingvo estu uzata kiel laborlingvo. Estis eldonitaj multaj lernolibroj kaj revuoj, oni verkadis grandan fervojistan vortaron en Esperanto.

Bedaŭrinde tiu prospera tempo finiĝis en la jaro 1950 post enkonduko de t.n. Plano de Marŝalo (usona militkompenca plano de Marshall post la dua mondmilito). Depost tiu tempo uson-

anoj en okcidentajn landojn penetrigis siajn produktojn, ne tradukinte instrukciojn por devigi alilandanojn lerni la anglan lingvon. Pro tio multaj junaj homoj perdis intereson pri Esperanto.

Nuntempe en Danio nia laboro aspektas mize-re. Funkcias E-klubo en kvin plejgrandaj urboj po kelkdek membroj. La plej dinamikaj estas la tri kluboj en Kopenhago kaj ĉirkaŭaĵoj. Plimulto estas emeritoj, kiuj pro malbona sanstato ne ĉiam partoprenas en ĉiusemanaj kunvenoj. Efektive venas ĉ. 15 personoj. Malgraŭ tiuj nefacilaĵoj okazas lingvoperfektigo, diversaj ludoj aŭ prezentado de lumbildoj kunportitaj de niaj kolegoj el diversaj vojaĝoj tra foraj landoj. Ni gastame akceptas en nia klubejo (La Esperanto-Fervojista Klubo, Kopenhago, strato Vasbygade nr. 10) ankaŭ alilandajn samideanojn. Nia klubo funkcias ĉiun lundon de 19a ĝis 22a horo

Eugeniusz Rybarczyk

Osmo Buller: la esperantisto de la jaro 2001

Internacia revuo "La Ondo de Esperanto" iniciatis en 1998 proklamon de la Esperantisto de la Jaro. Al tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj. La unua laŭreato en 1998 estis William Auld; en 1999 lin sekvis Kep Enderby. En 2000 la honoran titolon ricevis tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt.

Ĉi-jare la kandidatigoj proponis 15 personojn, al kiuj la elektantoj povis doni siajn voĉojn. La 15an de decembro estis anoncita la rezulto de la voĉdonado:

4 voĉoj: Osmo Buller, Claude Piron.

3 voĉoj: Renato Corsetti.

2 voĉoj: Rob Moerbeek.

1 voĉo: Detlev Blanke, Eva Farkas-Tatar, Georgo Handzlik, Ankica Jagnjiĉ, Povilas Jegoro-

vas, Ruben Torres, Walter Zelazny.

Laŭ la Regularo pri la Esperantisto de la Jaro: "Se pli ol unu persono ricevos egale plej multajn voĉojn, kiel laŭreato estos proklamita tiu, kiun proponis pli multaj kandidatigoj". Sekve Osmo BULLER estas elektita kiel la esperantisto de la jaro 2001, ĉar li ricevis du kandidatigojn kaj Piron nur unu.

Osmo BULLER per sia demisio en 2001 finis la rezultoriĉan deĵorperiodon kiel Ĝenerala Direktoro de UEA. Dank' al li la "Gazetaraj Komunikoj de UEA" regule kaj objekte informas la esperantistaron pri UEA. Lia septembra restado en Ĉinio kaj Litovio aktivigis la movadon tie kaj faris la rilaton de aŭtoritatoj en tiuj du landoj pli favora al Esperanto.

[Halina Gorecka, sekretario]

La kvara internacia fotokonkurso

"La Ondo de Esperanto" organizis en 2001 la kvaran Internacian Fotokonkurson. En la konkurso partoprenis 46 fotoverkoj de 15 aŭtoroj el 10 landoj: Britio, Ĉeĥio, Finnlando, Francio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Litovio, Pollando, Ruslando.

La 18an de januaro 2002 la juĝkomisiono anoncis la rezulton.

1a premio: Anna Skudlarska (Pollando) pro "Estimo" kaj "Revo".

2a premio: Gra•vydas Jurgelevišius (Litovio) pro "Avo kaj nepoj".

3a premio: Robert Kamiński (Pollando) pro "Sonorilturo".

Laŭdaj mencioj:

Raita Pyhälä (Finnlando) pro "Ĝuu";

Igorj Loĵkin (Ruslando) pro "Fangorn";

Andrea Ottrok (Hungario) pro "Ankaŭ tio estas Frankfurt".

La speciala premio pro foto teme ligita kun Esperanto ne estis aljuĝita.

Laŭ la Regularo de la Konkurso, la organizantoj havas ekskluzivan rajton ĝis la 31a de decembro 2003 uzi ĉiujn ricevitajn fotojn en pape- kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. La unua ekspozicio kun la plej interesaj fotoj de la unuaj tri konkursoj estis okazigita je la Zamenhofa Semajnfino (Kaliningrad, 15-16 dec 2001).

Dankon al la partoprenintoj! Gratulon al la laŭreatoj!

*Halina Gorecka
sekretario de la konkurso*

Nova verkisto inter finnaj esperantistoj

Lastatempe eldoniĝis la unua verko de Lauri Häkli, pli bone konata kiel pentroartisto. La romano estas finnlingva kaj nomiĝas "Askelten jäljet". Ĝin eldonis MC-Pilot Oy Kustannus. Demandu en via librovendejo. Havebla ankaŭ ĉe la aŭtoro.

Esperanto-kurssit

Valamon kansanopistossa 1.-5.7.2002

Kahtena viime kesänä on esperantokurssit järjestetty onnistuneesti Valamon kansanopistossa Heinävedellä. Erinomaisesta opetuksesta ja monipuolisesta ohjelmasta Valamon rauhallisessa ilmapiirissä on saanut nauttia jo 53 innostunutta kurssilaista.

Myös ensi kesänä on mahdollisuus osallistua Valamon kursseille. Kurssiaika on 1.-5.7.2002. Kurssitasoja on jälleen kolme: alkeet, jatko ja keskustelu. Alkeiskurssilla (taso 1) tutustutaan kielen perusteisiin ja kurssi antaa hyvät valmiudet jatko-opiskeluun itsenäisesti tai ryhmässä. Opettajana *Sylvia Hämäläinen*. Jatkokurssi (taso 2) on tarkoitettu kieltä jo jonkin aikaa käyttäneille tai kielen alkeet joskus oppineille. Keskustelukurssille (taso 3) osallistuvat osaavat jo sujuvasti käyttää kieltä kaikissa tilanteissa ja hakevat kurssilta lisävahvistusta kielitaidolleen. *Atilio Orellana Rojas* opettaa sekä jatkokurssia että keskustelukurssia. Keskustelukurssilaiset tekevät itsenäisiä harjoituksia aamupäivisin ja

liittyvät jatkokurssilaisten ryhmään iltapäivän tunneiksi. Kaikki kolme ryhmää tekevät yhdessä retkiä Valamon kauniissa luonnossa. Ja tietenkin on mahdollisuus kiinnostuksen mukaan tutustua ortodoksisen luostarin elämään. Päiväkohtainen ohjelma ilmestyy myöhemmin.

Viiden päivän kurssin hinta on kansanopiston hotellitasoisessa majoitusrakennuksessa 249 • (1 hh) ja 215 • (2 hh) tai retkeilymajatasoisessa vierasmajassa 198 • (1 hh) ja 182 • (2 hh). Hintaan sisältyy majoitus, opetus, aamiainen, lounas, päiväkahvi ja iltatee päivittäin sekä viimeisenä iltana juhlaillallinen. Mahdollisuus tulla paikalle sunnuntaina 30.6. ilman eri yöpymismaksua.

Ilmoittautuminen tapahtuu suoraan Valamon kansanopistoon, osoite: 79850 Uusi-Valamo, puhelin 017-5701400, faksi 017-5701402, sähköposti: valamon.kansanopisto@valamo.fi. Ilmoittautuessasi mainitse ehdottomasti ja vain yksi kurssitaso, jolle osallistut. Opisto lähettää

ilmoittautuneille maksulomakkeen ja lisätietoja. Kurssi järjestetään yhteistyössä Suomen Esperantoliitto ry:n kanssa, jonka yhdyshenkilöinä toimii Tiina Oittinen, os. Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, puh (02) 230 5319, s-posti: sekretario@esperanto.fi

Suomen
Esperantoliitto ry



*Jukka Laaksonen kaj
Atilio Orellana Rojas
en Valamo lastsomere.*

Esperanto-kursoj en Civitana instituto de Valamo 1.-5.7.2002

Dum du pasintaj someroj okazis sukcesaj Esperanto-kursoj en Civitana instituto de Valamo en Heinävesi. Jam 53 kursanoj povis ĝui bonegan instruadon kaj multflankan programon en trankvila monaĥeja ĉirkaŭaĵo.

Ankaŭ venontsomere eblis partopreni Esperanto-kurson en Valamo. La kurso okazos ekde la 1-a ĝis la 5-a de julio 2002. Denove okazos trinivelaj kursoj: elementa, daŭriga kaj diskuta. En elementa kurso oni konatiĝas kun la bazaj faktoj de la lingvo kaj la kurso donas bonan kondiĉon por progresi aŭ en kurso aŭ memlernade. Instruos *Sylvia Hämäläinen*. La daŭriga kurso estas celita por tiuj, kiuj jam iom uzadis la lingvon. Diskuta grupo estas celita por personoj, kiuj jam flue parolas la lingvon kaj serĉas fortigon por sia lingva kapablo. *Atilio Orellana Rojas* instruos kaj la daŭrigan kaj la diskutatan grupon. La diskuta grupo faros memstarajn ekzercojn kaj diskutos pri diversaj temoj antaŭtagmeze kaj partoprenos la lecionojn de la daŭriga kurso posttagmeze. Ĉiuj tri grupoj havos komunan programon vespere, ekz. farante ekskursojn en la ĉirkaŭanta bela naturo. Eblas krome laŭvole konatiĝi kun vivo en grek-ortodoksa monaĥejo. La taga programo aperos pli poste.

La aliĝkotizo de la kvintaga kurso estas 249 • (1-lita ĉambro) aŭ 215 • (2-lita ĉ.) en hotela nivelo kaj respektive 198 • kaj 182 • en gasteja nivelo. La kotizo inkluzivas tranoktadon, instruadon, matenmanĝon, lunĉon kaj vesperan teon tage kaj jaude vespere anstataŭ vespera teo bankedon. Alvenonte la 30-an de junio oni ne bezonos krompagi pri la ekstra tranokto.

La kursojn aranĝos la civitana instituto, sed ĉar la institutaj oficistoj ne parolas Esperanton, eksterlandanoj nepre aliĝu pere de Esperanto-Asocio de Finnlando, adr. Siltasaarekatu 15 C 65, 00430 Helsinki, tel +358-9-715 538 (deĵor-

ado marde vespere, alitage respondilo), retroŝto: sekretario@esperanto.fi Bv. nepre informi la celitan kursnivelon kaj elekti nur unu. Limdato de la aliĝo estas la 31a de majo. Aliĝante vi povos interkonsenti pri pagomaniero. Ĉiuj aliĝintoj ricevos porte konsilojn por vojaĝi al la kursloko kaj pri la loko mem.

Bv. noti, ke ĉar Esperanto-Asocio de Finnlando ne estas la aranĝanto, ĝi nek povos sendi invitilojn al eksterlandanoj nek garantii vizojn.

Esperanto-Asocio de Finnlando



Instruista seminario post la kurso

La semajnfino post la esperantokurso en Valamo ELFI okazigos seminarion por instruantoj de Esperanto. Atilio Orellana Rojas konatigos nin kun manieroj instrui la lingvon. Bonvenaj partopreni estas ankaŭ esperantistoj kiuj neniam instruis Esperanton, sed kiuj prikonsideras tion fari iam estonte. Pli da informoj aperos en la sekva numero.

*Carola Antskog
Prezidanto de ELFI*

Esperanto-klubo de Helsinki

Toimisto avoinna tiistaisin klo 17-19, osoite Sil-
tasaarenkatu 15 C 65.

19.02. Helsingin esperantoseuran vuosikoko-
us toimistolla klo 18.00 alkaen.

Esperantosocieto Antaŭen

Klubvesperoj okazos en la klubejo NESTO Sa-
takunnankatu 30 C 6. La vesperoj okazas lunde
kaj komenciĝas je la 17a.

La enirejaj pordoj fermiĝas aŭtomate precize
je la 17a tial bonvolu veni iomete pli frue.

18.2. Jarkunveno. Ni kontrolas, kion ni faris
dum la pasinta jaro 2001. Ĉiuj membroj estas
invititaj kontroli.

18.3. Marta vespero. Ni konatiĝos kun Forta-
lezo en Brazilo, venonta kongresurbo.

Jyväskylä esperantokerho

20.2 klo 16.30 Komiko en Kalevala, Pentti Mak-
konen.

6.3. klo 16.30 Madeiran muistoja, Aune ja
Pentti Makkonen.

Kaikki tilaisuudet: Sepänkeskus, huone Pro-
toni.

ELFI

Alvoko al jarkunsido

Jarkunsido de Esperanto-Ligo de Finnlandaj
Instruistoj ELFI okazos sabate la 23an de marto
2002 je la 17h30 en Suomen Nuoriso-Opisto en
Mikkeli. Estas traktotaj laŭstatutaj aferoj kaj la
nova statuto.

Estraro

Kokouskutsu

Suomen opettajain esperantoliitto ry:n vuosiko-
kous pidetään lauantaina 23. maaliskuuta 2002
klo 17.30 Suomen Nuoriso-Opistossa Mikkeli-
ssä. Käsitellään sääntömääräiset asiat sekä uu-
det säännöt.

Johtokunta

Maaliskuun valopilkku!!!

FEJO-viikonloppu

22.-24.3.2001 Mikkeliissä

Luvassa osallistumista Suomen Esperantoliiton
Talvipäiville, syömistä, juomista, saunomista,
laulua, naurua, ensiluokkaista seuraa!

Majapaikkana punainen piilopirtti Hirolassa
noin 20 kilometrin päässä Mikkelistä. Eksootti-
set olosuhteet: juokseva vesi ämpärissä ja ulko-
vessa. Sähköä ja lämpöä riittää. Ensimmäiselle
10-12 ilmoittautuneelle patja tai sänky taattu,
makuupussit messiin.

Mikkeliin matkataan näillä näkymin junalla
ja kyydit perillä järjestetään kimpptaksilla tai
autollisten hyväsydämyyteen turvautuen.

Muistathan ilmoittautua Talvipäiville! Ohjel-
man ja ilmoittautumislomakkeen löydät tästä
lehdestä. Majapaikan varmistat ilmoittamalla
tulostasi Katjalle: katja.lampinen@edu.stadia.fi,
040 523 6076. Mukana viikonlopun suunnitte-
lussa ja aikatauluissa pysyt parhaiten seuraamal-
la FEJO:n postituslistaa. Ohjeita: [http://groups
.yahoo.com/group/fejo](http://groups.yahoo.com/group/fejo)

Kutsu – Invito

La 23.3.2002 klo 17

FEJO:n sääntömääräinen vuosikokous Talvi-
päivien yhteydessä Suomen Nuoriso-opistossa,
Paukkulantie 22, Mikkeli.

Sa 23.3.2002 je 17 h

Laŭstatuta jarkunveno de FEJO lige al la Vintr-
aj Tagoj en Suomen Nuoriso-opisto, Paukkulan-
tie 22, Mikkeli.

Hallitus – La estraro

☰ Korespondi deziras

Komencanta e-isto volas korespondi kun divers-
landanoj por praktiki la lingvouzon kaj havi ge-
amikojn en diversaj landoj. Agas 24 jarojn, in-
teresigās pri fremdaj lingvoj, psikologio, litera-
turo, muziko kaj ankaŭ komputiloj.

Dariusz Pietkowski, p.dariusz@wp.pl

Glacipilko de FEJO

FEJO daŭrigis en Turku sian kelkjaran sporteman tradicion. La sportspeco estis nun glacipilko. Turku kaj Vantaa formigis Nordan Unuiĝon kaj kontraŭis la teamon de Suda Marbordo, al kiu apartenis Helsinki kaj Porvoo. La teamodivido kaŭzis tian etan kritikadon, ke Porvoo estas fakte pli norda ol Vantaa, kaj ke ankaŭ Vantaa havas peceton de la suda marbordo. Grave tamen estas, ke oni tiel formigis du egalnombrajn teamojn, kiuj estis ankaŭ pli egalfortaj ol kelkaj antaŭaj teamodividoj.

Oni povis antaŭtaksi, ke Nordo ŝajnis pli forta teamo kun siaj du grandaj atakantoj kaj en defendo falĉista figu-

ro, kiu jam per aspekto timigis la kontraŭan teamon. Sudo tamen respondis kun tre koncentrita defenda taktiko, kiu en komenco bone blokis la Nordan atakemon, kaj Sudo ja faris la unuan golon. Iom post iom Nordo tamen trovis vojon tra la Suda defendo kaj faris egaligan golon kaj pli.

Sudo tamen ankoraŭ ne volis facile cedi. Per la batalema defendotaktiko kaj rapidaj kontraŭatakoj Sudo foris post foron respondis al Nordaj goloj ĝis la poentoj estis 8-5. Fine tamen la fortoj de Sudo ŝajnis finiĝi. La veterano en la Suda teamo ŝanĝis taktikon al takladi kaj kaptadi la ĉefan stelulon de Nordo. Tio tamen estis ne tre sukcesa taktiko kaj Nordo nur faris iajn

pliajn golojn, ĝis la golsituacio estis 13-5. Tiam oni povis konstati, ke la potenco de glacipilko estas en la Nordo, kaj daŭris la tradicio de FEJO-sportoj, ke Helsinki estas ĉiam en la malvenkanta teamo.

Post la FEJO-ludo ni daŭrigis ludadon kun kelkaj lokaj knabetoj. La Suda teamo prenis kun si la plej bonajn ludantojn de ili kaj tiel formiĝis ankoraŭ pli egalfortaj teamoj. Post ega ŝvitado formiĝis golpoentoj 7-5, nun estis venkinta teamo tiu, kies bazo estis la Sudo de FEJO. Bone por ni estis, ke ni ne proponis ludadon FEJO kontraŭ la lokaj knaboj, ĉar la eble dekjaraj knaboj estis klare pli bonaj ludantoj ol ni.



Grupa foto de la glacipilkoludintoj. La Nordan teamon formigis la en bildo de maldekstre 1-a, 5-a kaj 6-a ulo. Inter ili estas la triopo de la Suda teamo, kiu ĉi tie jam klare havas malfacilecon stari.

Astronomia observejo de Iso-Heikkilä

La universitato de Turku konstruis astronomian observejon en urboparto Iso-Heikkilä, kiam ĝi estis ankoraŭ en senluma kamparo. La unua observejo pretiĝis jare 1925. Ĝi estis ligna kaj bruliĝis. En jaro 1937 pretiĝis la brika observejo, kiu estas ankoraŭ en hobiastronomia uzo.

Komence la observejo estis duparta, estis aparte apudaj observejoj de la universitato kaj la hobiastronomia societo Turun Ursa. Poste oni konstruis ĉambron inter la du ejoj tiel kunigante ilin. La ĉefaj aktivuloj en ili estis ekde la komenco la samaj homoj, la plej rimarkinda de ili estis profesoro Yrjö Väisälä (1891–1971). Li kaj lia laborpartnero Liisi Oterma (1915–2001) estis ankaŭ esperantistoj. Astronomia revuo nomata Tähtitaivas, kiun Turun Ursa eldonis en jaroj 1942–1978, ĉiam havis Esperantan resumon en fino.

La plej faman sciencan laboron Väisälä faris en trovado de planetetoj (aŭ asteroidoj), objektoj, kiuj similas kun planedoj, sed estas malpli grandaj. Entute astronomiistoj trovis kaj listigis milojn da planetetoj, el kiuj proksimume 800 trovitaj en Iso-Heikkilä. Planetetojn oni nomigas per numero kaj ofte aldona lingva nomo, kiun la trovinto rajtas elekti. Inter la en Iso-Heikkilä trovitaj planetetoj estas multaj por ni konataj nomoj, kiel 1495 Helsinki, 1496 Turku, 1947 Iso-Heikkilä, 1656 Suomi, 1421 Esperanto kaj 1462 Zamenhof. Väisälä inventis novan matematikan rimedon por el observoj kalkuli la

orbiton de planeteto. Li ankaŭ faris multajn plibonigojn por astronomia observilaro, kiuj ofte pli aŭ malpli rilatis kun la serĉado de planetetoj.

La science plej bonaj tempoj de Iso-Heikkilä estis fino de 30-aj jaroj kaj komenco de 40-aj jaroj. La militoj ne tute ĉesigis la sciencan laboron, kvankam certe malhelpis ĝin. Post la militoj la urbo daŭre kaj rapide kreskis. Lumoj pliiĝis, oni konstruis domojn en la cirkaŭaĵo, kaj super ĉio proksima ferfabriko produktis fulgon, kiu malpurigis la lensojn kaj spegulojn de la teleskopoj. Jare 1951 la universitato decidis konstrui novan observejon fore de la urbo, en vilaĝo Tuorla de komunumo Piikkiö 15 kilometroj de Turku.

Ankaŭ Tuorla ne plu estas tute libera de lumoj, domoj kaj lumigita vojo estas en proksimo, sed oni uzas ĝin. La universitato uzas nuntempe ankaŭ observejojn en la Kanaria Insularo apud nordokcidenta bordo de Afriko, kaj en Ĉilio en Sudameriko. La observejon de la Kanaria Insularo posedas la nordiaj landoj kune, kaj la observejon en Ĉilio la Eŭropa spacoexplora organizo ESA. Krom foresto de lumo, en tiuj lokoj estas ankaŭ pli bona vetero por astronomia observado.

La universitato ne tuj 1951 tute lasis la observejon de Iso-Heikkilä, sed en la 70-aj jaroj ĝi movis ĝian ĉion astronomian aktivadon al Tuorla, kaj Turun Ursa prenis la tutan lokon por sia uzo. La revuo Tähtitaivas kun siaj Esperantaj resumoj ĉesis eldon-

Italio invitas...

Tradicia Internacia Junulara Festivalo okazos de la 27a de marto ĝis la 2a de aprilo 2002 en Fenestrelle, Italio. FEJO havas rajton sendi du partoprenantojn al IJF kun repago de vojaĝkostoj.

Se vi volas partopreni, bonvolu kontakti kun la estraro de FEJO, kiu decidas pri la du stipendiatoj. Vicprezidanto Pipsa: pipsa@mail.com, 050 341 3334 aŭ sekretarino Katja: katja.lampinen@edu.stadia.fi, 040 523 6076.

Perinteinen Internacia Junulara Festivalo järjestetään 27.3.-2.4.2002 Fenestrellessä Italiassa. FEJO lähettää tänäkin vuonna tapahtumaan kaksi edustajaa, joiden matkakulut korvataan Suomen Opetusministeriön tuella. Lähde tapaamaan mielenkiintoisia ihmisiä eri puolilta maailmaa, oppimaan lisää esperantoa ja pitämään hillittömän hauskaa!

Ilmoita mielenkiinnostasi mahdollisimman pian FEJO:n hallitukselle, joka päättää osallistujista. Ota yhteyttä varapuheenjohtaja Pipsaan: pipsa@mail.com, 050 341 3334 tai sihteeri Katjaan: katja.lampinen@edu.stadia.fi, 040 523 6076.

iĝi, oni kunigis la verkintajn fortojn kun la en Helsinko eldonata revuo *Tähdet ja avaruus*. En jaro 1976 la societo kaj la observejo spertis reaktivadon per novaj aktivuloj, kiuj komencis fari revuon *Ceres*. Ĝi ne havis Esperantan resumon kaj estas malpli profesia ol *Tähtitaivas* estis.

La nomo de revuo *Ceres* venas de planedeto 1 *Ceres*, kiu laŭ sia numeronomo estas la unua trovita planedeto. Ĝi ne apartenas al en *Iso-Heikkilä* trovitaj, ĝin trovis italo *Giuseppi Piazzi* jare 1801. Ĝi estas la plej granda planedeto kun diametro 913 km, kiu estas dekkvino de la diametro de la *Tero* kaj kvarono de la diametro de la *Luno*. La planedeto *Ceres* ricevis la nomon de antikva dio, kiel estis la kutimo por ĉiuj planedoj kaj la unuaj planedetoj.

La societo *Turun Ursa* daŭre montras ĉielajn objektojn por publiko kaj faras la revueton *Ceres*. Publikaj montradoj okazas ĉiuvendrede je 19–21 en mallumaj tempoj de jaro, aŭ por grupoj en aparte konsentitaj tempoj. La ferfabriko *feliĉe* ne plu funkcias, kaj ankaŭ la nunaj leĝoj pli bone malpermesas malpurigadon de aero. Altaj domoj en la najbaro de la observejo tamen estas kaj restas, blokante grandan parton de la ĉielo kaj produktante ĝenantan lumon.

La plej uzata observilo de *Turun Ursa* estas 150-milimetra lensoteleskopo. La mezuro de teleskopo signifas la diametron de la objektivilenso en lensoteleskopoj, aŭ diametron de la ĉefspiegulo en speguloteleskopoj. La diametro de la ĉefa optika parto estas la plej signifa mezuro de astronomia teleskopo, ĉar ĝi difinas, kiom da lumo la teleskopo kolektas. Per variaj okulraj lensoj oni atingas variajn grandigojn de la observata objekto, sed la diametro de la ĉefa optika parto limigas la uzeblan grandigon. En *Iso-Heikkilä* oni ofte uzas ekzemple 80-oblan aŭ 400-oblan grandigon. 150 mm estas por hobiastronomio mezgranda teleskopo. *Turun Ursa* havas ankaŭ 200-milimetran lensoteleskopon kaj 500-milimetran, kiun oni povas uzi nur por fotografio. La plej grandaj hobiastronomiaj teleskopoj estas proksimume 1-metra kaj la plej granda teleskopo de la mondo estas 10-metra.

Post la reaktivado de la 70-aj jaroj la societo vidis jam kelkajn ŝanĝiĝojn de generacio, kvankam la plej malnovaj nunaj aktivuloj aktivis jam ekde komenca parto de la 80-aj jaroj. Nuntempe profesiaj kaj hobiaj astronomioj estas pli apartaj ol en la tempo de *Yrjö Väisälä*, nur malmultaj de nunaj aktivuloj estas pro-

fesiuloj. Kaj aliflanke nuntempe profesiaj astronomiistoj tiom specialigis en iun sektoron de astronomio, ke multaj preskaŭ neniam vere observas ion per teleskopo.

Spertoj de FEJO

Dum sia *Turku*-ekskurso decembre FEJO vizitis la observejon de *Iso-Heikkilä*. Tiam estis nuba vetero kaj eblis nenion vidi tra teleskopo, sed en tiaj okazoj la societo montras diapozitivojn de la ĉielaj objektoj.

La FEJOanoj tre interesis pri cirkonstancoj en aliaj planedoj. Kelkaj eble revis pri loĝado en pli suna loko, sed malĝojiĝis aŭdinte pri la planedoj pli proksime de la *Suno*. En la sunluma flanko de *Merkuro* estas varmego de centoj da gradoj kaj en la malluma flanko frosto de centoj da gradoj. En *Venuso* estas ĉie centoj da gradoj, ĉar la dika atmosfero kaŭzas fortan vitrodoman efikon. Krome la atmosfero de *Venuso* enhavas multan sulfuran acidon. *Merkuro* ja tute ne havas atmosferon.

Pri *Marso* la FEJOanoj vidis tute ruĝan pejzaĝon, kion kaŭzas, ke la grundo de *Marso* estas plejparte rusta fero. Ili opiniis, ke marsanoj ne povas esti verdaj, ĉar verdaj marsanoj apud la tute ruĝa pejzaĝo aspektus tro malbele. Laŭ tiu logiko ni devas opinii, ke oni ne alportu Esperanton al *Marso*, ĉar ankaŭ la verda Esperanto-flago apud la ruĝa pejzaĝo estus tro malbela.

Vidante *Jupiteron* la FEJOanoj diskutis pri kondiĉoj por ekzisto de vivo. Antaŭe oni pensis, ke *Marso* estus la plej verŝajna loko por vivo ekster la *Tero*, sed nuntempe oni supozas, ke ĝi estas tro malseka. Pli ebla loko por vivo povus esti unu *luno* de *Jupitero*, kiu havas nomon *Europa*. La FEJOanoj ankaŭ demandadis, ĉu vivo ne povus ekzisti en *Jupitero* mem. Tio tamen estas ne tre verŝajna, ĉar *Jupitero* estas nur gasa kaj likva planedo. Vivaj estaĵoj apenaŭ povas nur flugi en gaso, kaj la internajn likvajn partojn de *Jupitero* regas grandega premo.

Oni ankaŭ iom diskutis pri la ebloj de la homaro trovi signon pri ekzisto de vivo ekster la *Sunsistemo*. Tio ja eblus troviĝi observante lumon aŭ alian radiadon, kiu venas el foraj partoj de la spaco. La radiaj kaj televidaj elsendaĵoj de ni estus bone troveblaj ĉe la najbaraj steloj. Ekzistas projekto por trovi alian intelektan estaĵaron, *SETI*, kiu tamen dum kelkaj dekoj da jaroj nenion trovis.

Mikko Mäkitalo

Gastoj el Rio de Janeiro

(unua parto aperis en EL 6/01)

Denove kelkajn tagojn hejme en Lappeenranta dum kiuj Almir kaj Zilda vizitis ĉe somerhejmo de finna-brazila familio sur insulo de Finna Golfo. Dum tiuj tagoj ili kapablis instigi ilian brazilan mastrinon Maria Hyrylä tiel, ke ŝi komencis lerni Esperanton en la kurso, kiun gvidas Jorma Toropainen.

Ĉar Sankt-Peterburgo estas proksime, nur 200 km de Lappeenranta, ni faris tien tritagan ekskurson. Valeria Cvetkova gvidis nin tre bone kaj agrable. Ŝi bonege konas sian hejmurbon kaj povas rakonti multe pri ĉiu palaco kaj ĉiu skulptaĵo. Almir diris, ke li konatiĝis kun ĉiu rajdanta heroo de Rusio! Unu tagon ni pasigis en belega parko de Peterhof. En Esperanto-Klubo "Espero" ni renkontis aliajn esperantistoj de Sankt-Peterburgo. Multon ni vidis en tri tagoj, dank' al esperantista amiko, kiu per aŭto veturigis nin dum tiuj tagoj.

Unu tago denove hejme, dum kiu mi aranĝis kunvenon de nia Esperanto-grupo en mia hejmo. Kaj matene aŭtobuse al la flughaveno de Helsinki kaj flugo al Rovaniemi, kie nin akceptis

Marjaliisa Parpala kaj Aira Vuopala. En sekvonta tago ni renkontis ankaŭ la trian esperantiston de Rovaniemi: Jorma Liste. Ni vidis multajn interesaĵojn, ekz. boacojn en "Stato de Kampsuherra", kie verkisto Oiva Arvola mem gvidis nin kaj rakontis iom pri mistikaĵoj de Laponio. Kompreneble ni vizitis ĉe Polusa cirklo kaj en Laborejo de Julavo, kie Zilda kaj Almir aĉetis multajn suvenirojn por porti hejmen. Bona memoraĵo estis ankaŭ nia komuna foto kun Julavo. Julavo vizitis en sia rolo en Rio de Janeiro antaŭ du jaroj. En Rovaniemi Almir kaj Zilda trovis McDonalds, kiun oni reklamis kiel la plej norda en la mondo kaj tie ja ni nepre devis manĝi. Kvin tagoj bone pasis en la ĉefurbo de Laponio en prizorgado de niaj nordaj amikoj.

Ni revenis al Helsinki kaj en sekva posttagmezo mi kun Salme Tiili adiaŭis niajn karajn malproksimajn gastojn antaŭ ekiro de ilia aviadilo. Pli ol kvin semajnojn mi vagadis kun ili ĉi tie en Norda Eŭropo. Almir kaj Zilda fotis ĉirkaŭ sescent fotojn kaj multajn horojn per videofilmilo. Certe nun iliaj amikoj en Brazilo konatiĝos kun niaj nordaj cirkonstancoj. Ili ricevis

multajn novajn geamikojn kaj havas multajn memorojn el Nordo. Kaj mi sentas, ke ni estas pli proksimaj geamikoj post niaj komunaj spertoj.

Irja Miettinen



**Lokaj
esperantistoj
kun siaj
gastoj.**

Intervjuo kun Kimmo Hakala

– *Kimmo, kiam vi unue interesigis pri Esperanto kaj kial?*

Mi entuziasmiĝis pri Esperanto en 1980, kiam ni translokiĝis de Savo al Helsinko. En la subtegmento de nia loĝejo ĉe Hämeentie-strato, inter la postlasaĵoj de la antaŭa posedanto, kuŝis blua kajero plena je notoj en nekonata lingvo (Esperanto!). Ankaŭ mia frato Mikko jam pli frue interesigis pri Esperanto. Tuj Esperanto impresis min kiel alloga ŝatokupo.

– *Kiel vi lernis la lingvon?*

La unuajn lecionojn de la nova ekscita lingvo mi spertis en kurso de la Laborista Instituto en Helsinko. La instruistino estis entuziasmiga kaj unika, nome Marjatta Rautio. Ankoraŭ nun mi kun emocio memoras ŝian ordonon ”hontu”! Post la kurso mi ekkorespondis tutmonde.

– *Ĉu Esperanto vere utilis al vi iam?*

Oftege! Jen ekzemploj: En Santiago de Compostela, Hispanio, senpaga loĝado dum unusemajna



Kimmo kun tradicia ludilo.

simpozio. En Francio kaj Litovio Esperanto ege plifaciligis la lernadon de mia nuna metio (salikokultivado). El Kubo mi kunportis belegan memoron pri la kongreso kaj pri la hejma festo ĉe mia leteramiko en malnova Havano.

– *Bonvolu rakonti ion pri E-gasto(j), kiu(j) vizitis vin en Vesanto?*

Pri ĉiuj niaj E-gastoj, senescepte, restis nur bonaj enkoraj memoroj. Mi menciuj kiel ekzemplojn la ĉionfaranton Janis el Latvio, la bonhumorajn gitaristojn Joan kaj Miguel el Katalunio, la francan Robert, kiu parolas 13 lingvojn, kaj la biciklantan Piotr el Pollando, kiu jam fariĝis kvazaŭ familiano...

– *Rakontu tre mallonge, kia estas via ĉirkaŭaĵo!*

Ni loĝas en la naturo, ŝirmate de arbegoj. Ĉe ni eblas aŭskulti la silenton.



Arttu kun “cerbumilo”.

– *Kian familion vi havas? Kia estas ilia sinteno al Esperanto?*

Mia familio konsistiĝas el mia edzino Hillevi, nia filo Arttu, kiu komencis vizitadi la lernejon aŭtune 2001, kaj la avinjo Raili. Ankaŭ Martti-ansero, la katoj Eetu kaj Roskissa kaj la virkoko Otto kun siaj kvar edzinoj membras en nia familio. Esperanto estas nia komuna ĝojo.

– *Ĉu troveblas en Vesanto aliaj, kiuj interesiĝas pri E-to?*

Deko da vesanto-anoj iel okupiĝas pri Esperanto, tre aktivaj estas kvar el ili.

– *Ĉu vi bonvolas rakonti iom pri viaj planoj por la komenciĝinta jaro?*

Printempe ni plantos ankoraŭ pli da saliko-stikaĵoj en kampon. Ĉi momente kreskas jam en niaj kampoj pli ol 100 diversaj specioj de saliko, por

metiistoj kaj manlaboristoj. Plue, mia interesiĝo pri ”cerbokaptiloj”^{*} fariĝis laboro. Ni daŭre elpensas kaj faros novajn ”cerbumilojn”.

Lopuksi vanha vesantolainen viisau: Kyllä konstit aina löytyy kunhan vaan vaikeuksia riittäisi! Malnova saĝa diraĵo el Vesanto: Rimedoj ne finiĝos se malfacilaĵoj sufiĉos! Pere de ĉi revo mi deziras saluti ĉiujn niajn Esperanto-geamikojn. Terveisiä kaikille esperanto-ystävilemme! Sähköposti sallittua!! Retpoŝto akceptata: <kimmo@esperanto.fi>

Intervjuis Saliko

* ”Cerbokaptiloj”, ”cerbumiloj” estas ludiloj aŭ aĵoj, kiuj tiklas la scivolemon kaj igas homon provi solvi praktikan problemon, ekz. kiel mal-kunigi du ŝajne nemalkunigeblajn erojn. Ofte ili estas el ligno, led, metalo.



Cerbumiloj kaj tradiciaj ludiloj faritaj de Kimmo.

Välteletkö po-prepositiota?

Monen mielestä po-prepositio on outo, ja kyllä esperantoksi voi asiansa selvittää ilmankin sitä. Ruoditaan nyt tämä po-juttu niin, ettei välteletyyn ole enää aihetta.

Po-prepositiolla on slaavilainen malli. Ainakin venäjässä on *vastine*, mutta kun suomesta ja monesta muusta kielestä sellainen puuttuu, niin po-prepositiota on meidän hankala sijoittaa aivoihimme. Sitäpaitsi kielioppien esimerkit omenoineen tuntuvat vähän hassuilta, kun omenoista ei enää ole puutetta.

Miehet joivat kaksi lasia viiniä. Yhteensäkö vai kumpikin/jokainen kaksi? Tämän selventää po: *Ili trinkis po du glasojn* da vino*. Se tarkoittaa, että kumpikin/jokainen joi 2 lasillista. Voisi tietysti sanoa myös *Ambaŭ/Ĉiuj trinkis du glasojn da vino*, ja juuri siksi kaikki eivät käytä po-prepositiota.

Po'ta seuraa tavallisimmin lukusana. Kuvittele kauniisti katettu juhlasali ennen ateriala. *Po du boteloj staras sur la tabloj*. Pöydillä on kaksi pulloa kullakin. *Sur la tablojn oni metis florojn po unu bukedo*. Joka pöydälle oli pantu kukkavihko. *La gastoj venis po tri aŭ kvar*. Vieraat saapuivat kolmisiin tai nelisiin. *Ili sidis po kvar apud la tabloj*. Pöydissä istuttiin neljän ryhmissä. *Ili ricevis po unu glason* da ĉampano*. He saivat lasin samppanjaa jokainen.

Tämmöinenkin hauska esimerkki löytyi Plena Analiza gramatikosta: *Oni sidigis la dikegajn geedzojn po du seĝojn*. Lihava aviopari sai kumpikin pyllynsä alle kaksi tuolia.

Po-sanaa voi käyttää myös näin, varsinkin *aĉeti* ja *vendi* -verbien kanssa: *podetale* (vähittäin), *pogrande* (tukkukaupassa), *pometre* (metreit-

täin), *popece* (kappaleittain), *poskatole* (laati-koittain). Lääkettä voi ottaa tipoittain/lusikoittain. Medikamenton oni *prenas pogute/pokulere*.

Po-sanasta on tehty myös *poa* ja *poe*. Siellä juhlasalissa, missä äsken olimme, vieraat saivat lasin samppanjaa. *Ili ricevis poan glason da ĉampano*. Ja kahdesta keimailevasta opiskelijatyöstä kuiskailtiin: ”*Ili havas poe plurajn amantojn*.” Kummallakin näet oli useita miehiä. Ja eräästä lukutoukasta supistiin: *Li kunstelis sian bibliotekon po libro*. Ison kirjastonsa hän nimittäin oli hankkinut kirja kerrallaan varastamalla.

Entä tuntuvatko seuraavat esimerkit käyttökelpoisilta?

En lia monujo kuŝis 3 monbiletoj po 100 markoj. Hänen lompakossaan oli 3 sadan markan rahaa.

Estas haveblaj kvin premioj po 50 eŭroj. Jaossa on viisi 50 euron palkintoa.

La du bankieroj gajnis poan milionon da dolaroj. Molemmat pankkiirit nettosivat miljoona dollaria.

Petro estis dungita por 8 horoj po 20 eŭroj. Petro sai 8 tunnin pestin kahdenkymmenen euron tuntipalkalla. *Lia edzino laboris po ses horojn tage*. Vaimo teki töitä 6 tuntia päivässä.

Huomaa, ettei po-prepositio kuulu ”päivässä”-sanontaan. Ei sanota: *Ili marŝis 20 kilometrojn po tage* VAAN *Ili marŝis po 20 km tage*.

Mi lernas poiome. Opin vähän kerrallaan. (äänä: po-i-o-me)

Saliko

P.S. Kielinurkan 6/2001 esimerkki *La domo estis konstruita en 1994* herätti erimielisyyttä, varsinkin suomennoksin ”on rakennettu”. Huomautettiin, että sanotaan myös *La domo estas konstruita en 1994*. Kiva että esperanto on joustava kieli ja että kielinurkkaa luetaan.

*Akkusatiivin käyttö tällaisissa lauseissa aiheuttaa erimielisyyttä, toiset käyttävät ja toiset eivät.

Mondcivitaneco, inspiro de franca trobadoro Morice Benin

La diskojaro de Vinilkosmo komenciĝas per la disko "In-Spir" de franco Morice Benin. La muziko kaj la tekstoj de la kanzonoj estas plejparte de Morice Benin mem, kelkaj devenas de aliaj francaj komponistoj. La pecoj estas verkitaj originale france, sed tradukitaj lerte esperanten.

Temas pri trobadorecaj kantoj kun unu baze roka kaj tre danciga escepto. La stilo de Benin nin memorigas jen pri Jacques Yvert, jen pri sistempe fama esperanta grupo BAF aŭ pri la pola trobadoro Georgo Handzlik. Kiu ilin ŝatas, ŝatas supozeble ankaŭ ĉi diskon.

La tekstoj estas tre vortozaj kaj foje iom malfacile kompreneblaj. Sian inspiron la artisto tro-

vas en la ideo pri mond-civitaneco. Li ankaŭ revas pri muziko kiel kuniga ponto inter nacioj sen lingvaj bariloj. Liaj ideoj pri mond-civitaneco kaj Esperanto pli detale legeblas en la diskokajero. La ĉefaj tekstaj temoj de Benin ŝajnas krome esti ĝenerala cerbumado pri vivocelo, spicita per socikritiko, kaj strebo al feliĉo kaj silento.

La instrumenta mondo en ĉi disko estas tre riĉa: Aŭdeblas saksofono, violonĉelo, akordiono, klarineto, irlandaj bekflutoj fone al klavaroj kaj gitaroj. Benin certe komponis kelkajn belajn melodiojn, sed foje mankas kvazaŭ la spino de la kantoj. Ili iĝas tro abundaj kaj la aŭskultanto havas malfacilaĵojn atingi la etoson kaj la ideon.

Inter peco kaj peco oni volonte aŭdus iom pli da vario. Inter la kanzonoj estas kelkaj "parolkantoj". Iom ĝenas la orelon la fojfoje tro patosa voĉo de Morice Benin. Ĉu eble pli mola, pli trankvila kaj pli profunda voĉo pli kongruus kun ĉi tipaj melodioj? Supozeble la pecoj pli bone funkcias vive ol diske. Mi bone povas imagi, ke kelkaj el ĉi kantoj pompe pluvivos poste en esperantaj kantolibroj.

Riitta Hämäläinen



Konatiĝu pli kun Morice Benin en www.multimania.com/moricebenin (en la franca)

Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Ilkka Santtilalle, Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Terttu Tyynelä) PL 136, 40101 Jyväskylä
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☐ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkelä, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkelä.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salossa: Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☐ matti.wallius@pp.inet.fi
- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Rainer Arvola, Käräjätörmä 2 E 32, 33310 Tampere, ☐ andromeda@koti.tpo.fi)
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☐ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajain esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☐ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☐ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☐ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2002**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
2	1.3	15.3	1.4
3	1.5	15.5	1.6
4	1.7	15.7	1.8
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.


Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset mainostajat:	Jäsenet:
1/1 sivu 600 mk	1/1 sivu 300 mk
1/2 sivua 400 mk	1/2 sivua 200 mk
1/4 sivua 250 mk	1/4 sivua 125 mk

2

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Eta ilustrita vortaro por glacisportoj



(pli pri glacisportoj sur p. 23)

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuun alussa. Jutut 15.3.2002 mennessä Aimo Rantaselle. Venonta numero aperos en la komenco de aprilo. Artikoloj ĝis 15.3.2002 al Aimo Rantanen. Osoite/adreso: PL 2, FIN-40801 Vaajakoski, puh/tel. (014) 261 438, s-posti/rete: <esperantolehti@esperanto.fi>.

Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2002